

Ora Ĵurnalo

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGEBLAS ĈIUTAGE

Numero 63, Junio-Julio 2023



Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Bildo de la Literatura domo	1	Odoroj allogas kulojn	28
Enhavo.....	2	Zlatan	29
Espeporko meditas.....	3	La ardeo ekflugas – Hägern lyfter.....	30
La Literatura Domo de Gotenburgo.....	4	Rakonto de Quora, trovita de Roger Nilsson.....	31
La somera kurso de la Esperanto Societo de Gotenburgo	4	Mensa aritmetiko.....	32
Vizito al la biblioteko de Stannum la 15an de junio.....	8	Vendi kaj aĉeti monerojn, eĉ esperanta monero.....	32
Infano ricevis esperanto-poŝtkarton en la jaro 1953.....	8	Raporto de la Urba Asembleo 23-05-25	33
”Ĉu vi volus veni pilgrimi?”	9	La laboro por la klimato en la komunumo Alingsås.....	34
Preĝeja semajnfino en Sáltoluokta	12	Västsahara – en annan ockupation	35
La katedralo de Derby (Derby).....	13	Valhallabadet.....	37
Ĉarma Lovisa	17	Ĉio estas grava	38
El Odeso, Ukrainio, venas nova kontribuanto al Ora Ĵurnalo – Tatiana Auderskaja	19		
La bela rozo	19		
Erinaco.....	20		
Saluton el Aŭstralio	21		
Aventuro en Naŝvilo, Tenesio, kun Kristina Jonäng	23		
La buso kiu eraris pri la vojo.....	24		



Legu pri la ĉarma finnlanda urbo Lovisa en p. 17.

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com.

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.




Espeporko meditas



- 🌸 **Post multe da problemoj** aranĝi kurstagojn – antaŭ somermezo, tamen estis kursoj, ne en Gotenburgo, sed en najbara komunumo. Unue mankis kursejo, instruistoj kaj dum la unua tago mankis akvo en la kursejo. Tamen problemo post problemo solviĝis. La vetero estis bonega. La etoso ankaŭ estis bonega.
- 🌸 **Du pastroj**, Ragnhild kaj Emelie, kontribuas per tekstoj kaj bildoj. Du pilgrimadoj unu en la sudo, alia en la nordo, troviĝas en ĉi tiu somera numero. Preĝejoj aspektas malsame – la impona katedralo de Derby, la moderna Ekumena preĝejo en Gråbo kaj la eta Samea preĝejo – ili malsimilas, sed la enhavo de la diservoj plejmulte similas.
- 🌸 **Kalkulado:** Ĝuu la mensan matematikon de Roger, ĝuu la vendon kaj aĉeton de esperantaj moneroj en Londono, la multajn enpafitajn golojn de Zlatan kaj la multajn paĝojn de ĉi tiu numero de Ora Ĵurnalo. 😊 Se vi ne havas tempon engluti ĉion, ŝparu artikolojn al venontaj kurstagoj.
- 🌸 **Birdoj** ofte havas lokon en Ora Ĵurnalo. Ĉi tiun fojon temas pri grandaj birdoj: migrofalkoj en Derby, grandaj agloj kaj kondoroj en Tuluzo kaj ardeoj en Svedio.
- 🌸 **Krom Svedio** la sekvaj landoj estas reprezentitaj en ĉi tiu numero: Britio, Francio, Finnlando, Aŭstrio, Aŭstralio, Usono, Ukrainio. Ni bonvenigas Tatiana

Auderskaja el Ukrainio, novan kontribuanton!

- 🌸 **Dum la somera kurso** Magnus parolis pri lingvoproblemoj, kiam li kiel 6-jara knabo translokiĝis de Svedio al Kanado kaj kiel plenkreskulo revenis al Svedio. Antaŭ ol Esperanto fariĝos *Ĉies dua lingvo* oni povus uzi lingvoapon – tian kiel uzis la irano Ali. Ali multe helpis nin pri praktikaĵoj en la Ekumena preĝejo. Li nur loĝas en Gråbo ekde kelkaj monatoj. Kiam ni volis komuniki, mi parolis svede en lian poŝtelefonon kaj li povis legi mian parolon irane – kaj male. Tamen, teknika aparato neniam povas anstataŭi spontanajn interparolojn – esperante!
- 🌸 **Multaj personoj diras** ke politiko ne interesas ilin. Tamen ili estas influataj de la decidoj – aŭ manko de decidoj – fare de la politikistoj, kiujn ili elektis. Jesper fervore laboras en la Asembleo de Gotenburgo kaj mi alte taksas liajn raportojn. Bone ke oni sentas ke oni povas influi la politikon. En Alingsås la klimatgrupo provas klarigi al la politikistoj, ke urĝas eviti ke la temperaturo altiĝas. En Okcidenta Saharo tamen eĉ ne UN povas ĉesigi la okupon fare de Maroko.
- 🌸 **Ĝis la aŭgusta numero!** /Siv





La Literatura Domo de Gotenburgo

”Göteborgs Litteraturhus” estas senprofita asocio kaj loko kie la literaturo – en sia tuta ĉiuflankeco – centras sur la scenejo. La celo de la asocio estas profiti la literaturan engaĝiĝon de la membroj kaj la publiko kreante literaturajn programojn kaj ŝancojn renkontiĝi en, tra kaj ĉirkaŭ literaturo. La komerco estas karakterizita per malferma kaj scivolema aliro al la manieroj kiel literaturo okazas en la mondo. Iru al la Literatura Domo de Gotenburgo se vi ŝatas legi kaj verki aŭ simple okupiĝas pri la temoj, kiujn ni traktas en niaj programeroj – aŭ volas mem krei eventon. /Siv

Legu pli (svede) en <https://www.goteborgslitteraturhus.se/om/>

La somera kurso de la Esperanto Societo de Gotenburgo...



Mankas Soile sur la foto, farita de ĝardenlaboristo, kiu preterpasis.

....ne okazis en Gotenburgo, sed en la najbara komunumo Lerum, kie situas la Ekumena

Preĝejo de Gråbo. Niaj kutimaj lokaloj ĉe la studronda organizo Vuxenskolan en

Gotenburgo estis bezonataj por instruado de la sveda al rifuĝintoj el Ukrainio.

La kurstagoj estis mone apogitaj de SEF kaj Vuxenskolan kaj la kunlaboro kun la Ekumena preĝejo bone funkciis.

Malfrue la tagon antaŭ la kursstarto, ni eksciis ke la komunumo fermos la akvotubojn inter la 10^a h kaj la 20^a h lunde. Do ni plenigis tenuojn per akvo por la kuirejo kaj sitelojn per akvo por la necesejoj – kaj tio funkciis.

Kvar restoracioj troviĝas en promendistanco de la kursejo.

Marde la akvo funkciis. Ni komencis ĉiun matenon per muziko kaj kantoj. Christin Granat ludis la trumpeton kaj Agneta Järström la violonon kaj ni ĉiuj kantis. Entute ni estis 17 personoj en tri grupoj. Krom la lecionoj, ĉi tiun tagon okazis ke Lokalpressen, gazeto de Lerum, faris artikolon pri "Esperanto-språkkurs i Gråbo". Dum unu horo ni faris **la etan Gråbo-rondiron. Lasse Granat** laŭtlegis la tekstojn esperante je ĉiu halto, kaj espereble la ne-gråboanoj spertis ke ankaŭ eta vilaĝo havas interesan historion. Inter 1900 kaj 1967 Västgötabanan – la Vestrogotia Fervoja Linio – estis trafikata unue de vaportrajnoj kaj poste per relaŭtoj. Je la inaŭguro en 1900 reĝo Oscar II troviĝis

sur la trajno, kaj la popolo en Gråbo atendis vidi lin. Bedaŭrinde li dormis, kaj la trajno pluiris al Gotenburgo, lasante la gråboanojn kun malĝojaj mienoj.

Por la merkredo ni planis informi pri esperanto kune kun kantoj kaj muziko. Pluraj homoj estis invititaj, sed aŭ ili laboris, libertempis aŭ estis okupitaj pri aliaj aferoj.

Tamen estis bona ideo informi unu la aliajn, ĉar du venis el Stokholmo kaj kelkaj estis komencantoj. Eĉ ni en la gotenburga klubo ne tute konis unu la alian. Do, estis interese aŭskulti rakontojn pri esperantomemoroj.

Ĵaŭde estis planoj vidi la esperantobibliotekon en Stannum, sed nur unu persono neniam vidis ĝin. Mi veturigis Agneta al Stannum por mallonga vizito.

En la tablotenisa halo ne multaj personoj ludis, sed ili tie iris la **esperanto-historian promenon** de vando al vando. Se oni scias la respondon, la promeno estas pli mallonga ol se oni eraras. Estis meminstruanta promeno, sen papero kaj skribilo.

Je la tria ĵaŭde ni adiaŭis unu la alian kaj jam estas ideoj pri somerkurso en 2024.

Do, ĝis tiam – aŭ pli bone – ĝis la venonta evento ĉi tiun someron! /Siv

Nun sekvas kelkaj fotoj de la kurso: Unue la du muzikistoj Agneta kaj Christin





En la plej granda ĉambro, en la kuirejo kaj ekster la kursejo.





La eta Gråborondiro donis scion pri la historio de Gråbo, ekz. jam en 1849 oni konstruis la lernejon Lekstorpsskolan, sep jarojn post la leĝigo de deviga lernado en lernejo.

La 24an de junio ni povis legi pri la kurso en Lokalpressen, lokala gazeto.

La juna ĵurnalistino, Johanna Berglund, Lokalpressen, skribis, ke Esperanto estas internacia lingvo, kiu celas faciligi la komunikadon inter popoloj kun malsamaj lingvoj. Ŝi skribis, ke Esperanto havas longan historion ekde 1887. En la gimnazio de Lerum

okazis dum 12 jaroj esperantokursoj. (Erare ŝi skribis "dum la lastaj 12 jaroj". Efektive la kursoj okazis frue en la 2000a jardeko – sed ne gravas.)

Urĝis finfari la artikolon, kaj la juna ĵurnalistino tamen faris bonan laboron. Estis la unua fojo ke ŝi konatiĝis kun esperanto. / Siv

Esperanto-språkkurs i Gråbo

Esperanto är ett internationellt språk uppbyggt av internationella språkstammar. Det har ända sedan sin uppkomst haft som mål att underlätta kommunikationen mellan människor med olika språk. Under juni har Göteborgs Esperantoförening hållit en fyra dagar lång sommarkurs i språket i Gråbo.

Esperanto har en lång historia, den första läroboken i språket publicerades 1887, skriven av Ludwig Zamenhof, upphovsman av esperanto. Språket består av enkla grammatiska regler och ordstammar, som ska göra det lätt att lära sig. Idag finns talande i cirka 120 länder, och i början av den här veckan hölls en kurs i språket i Gråbo. På Lerums gymnasium har man kunnat studera esperanto de senaste tolv åren, genom elevernas individuella val.

Siv Burell från Gråbo är vice ordförande för Göteborgs Esperantoförening och kursansvarig. Hon berättar att de håller kurser genom Vuxenskolan i Göteborg

varje termin, och att de nu under sommaren kommer erbjuda en intensivkurs i språket.

– Det som gör språket så unikt är att det är så regelbundet, enkelt men samtidigt nyansrikt och relativt lätt att lära sig, säger hon.

Siv berättar att det hela tiden tillkommer nya ord utan att språkets struktur ändras, det gör att språket är det samma som vid dess uppkomst.

– En bok på esperanto från början av förra sekelskiftet känns ganska modern, medan en motsvarande på svenska känns föråldrad, säger hon.

Kursen genomfördes 19–22 juni, på Eumeniakyrkans ung-



Göteborgs esperantoförening har den här veckan haft en språkkurs i esperanto i Gråbos Eumeniakyrka. Siv Burell i mitten med grön tröja. BILD: PRIVAT

domsvåning, varav man den 21 juni erbjöd en informationsgenomgång för de som är intresserade att involvera sig i esperantogruppen.

– Jag tror inte att esperanto kommer få global spridning under min livstid, men jag har en förhoppning om att det blir större

inom de närmsta århundradena. Språket är så geniale uppbyggt och innehåller en fredstanke. För intresserade finns mycket information på vår hemsida, säger Siv Burell.

Johanna Berglund
johanna.berglund@lokalpressen.se

Vizito al la biblioteko de Stannum la 15an de junio

Kune kun Bo kaj Inger, parencoj el Skanio, Ingrid Becker vizitis min kaj kompreneble ankaŭ la esperanto-bibliotekon. Dekstre Ingrid staras ĉe statueto de Zamenhof, bone

farita de sia patro Arno Becker. De Ingrid la biblioteko antaŭe ricevis aron da leteroj senditaj al sia patro (Ora Ĵurnalo n-ro 57). Fakte estas kultura trezoro! / Siv



Infano ricevis esperanto-poŝtkarton en la jaro 1953

Arno, la patro de Ingrid Becker, Gotenburgo, ricevis poŝtkarton de Jan, amiko en Nederlando. Jan sendas gratulojn al Gert, la unu-jara filo de Ingrid, okaze de lia datreveno.


Provo kompreni la tekston:

Unue la plej junulo tutkore gratulata okaze lia unua datreveno. Plue la patrinon, la geavojn

kaj onklinon tute kore ni gratulas okaze tiu festo. Ke li kreskas en bona saneco!!! / Via letero ricevite en bonordo. Respondo poste agrablan tagon kaj vesperon ni deziras al vi ĉiuj.

Per forta manpremo

Via Jan V. den Haag



En 1955 venis el Nederlando du poŝtkartoj al la "etulo Gert":



"Ĉu vi volus veni pilgrimi?"

de Gudrun Norrfjärd, diakono en paroĥo Skallsjö, komunumo Lerum



– Ĉu vi volas veni pilgrimi?

– Nu, mi verŝajne ne povas, bedaŭrinde...

Tiel mi verŝajne respondus iom eviteme, se oni demandus min antaŭ kelkaj jaroj.

Mia bildo de pilgrimado estis ke ĝi estas malrapida kaj sufiĉe enuiga. Sed nun mi pilgrimas je regula intervalo, kaj mi faras tion kun ĝojo!

Por mi, la pilgrimado fariĝis movado kaj kunteksto, kie mi havas la ŝancon kunligi plurajn esencajn pecojn en tuton. Per la movado **Pilgrima marŝado por estonteco** mi trovis ion forte signifoplenan.

Pilgrima promenado por estonteco komenciĝis antaŭ la granda klimata "pintkunveno" en Glasgovo 2021.

Annika Spalde, diakono en la Eklezio de Svedio, gvidis 103-tagan promenadon de Vadstena ĝis Glasgovo. Ŝi marŝis la tutan vojon, sed multaj aliĝis al pli malgranda parto de la itinero. Krome, multaj diversaj "fratinaj promenoj" estiĝis aliloke, sed kun la sama celo.

Pilgrima promonado por estonteco temas pri **interna kaj ekstera transformo por daŭripovo kaj klimata justeco**. La mesaĝo kiu estas prezentata, kaj adresata kaj al ĉiu individuo kaj al niaj regantoj, povas esti resumita en la sekvaj punktoj:

- Prenu la klimatan krizon de la Tero serioze!
- Ŝanĝu al pli daŭrigebla vivo sur persona nivelo.
- Premo al mondaj registaroj: Tenu vin al la Pariza Interkonsento! Faru tujajn agojn por limigi mondvarmiĝon al maksimumo de 1,5 gradoj.
- Subteno por la politikistoj, kiuj kuraĝas gvidi la vojon.
- Aŭskultu la plej bonan klimatan esploron nuntempe disponeblan.
- Klimata justeco!

Tiamaniere la movado estas proksima al ekz. ***Vendredoj por estonteco*** en sia mesaĝo. Kio eble iĝas pli klara ĉi tie estas la graveco de **la interna transiro, kie la promonado fariĝas ilo ankaŭ por tio**.

Ekde aŭtuno 2021, ni en la paroĥo Skallsjö en Floda kaj Tollered, kune kun la paroĥo de Lerum, organizas pilgrimajn promenojn por interna kaj ekstera transformo kadre de la Pilgrima promonado por la estonteco.

Okazis vesperaj piedvojaĝoj, tagaj piedvojaĝoj, piedvojaĝoj lige al diservo aŭ meditado, piedvojaĝoj kun invitataj gastoj – kaj efektive nun en la nia ankaŭ ĉevaldorse. Komence de majo, ni organizis pilgriman veturon kunlabore kun Vårgårda-pastraro kaj Stålarp per islandaj ĉevaloj.

Komence de la pasinta somero, ni ankaŭ faris tritagan ekskurson de Falköping al Varnhem, meze de la plej bela flora somermeza sezono.

Ni estas malgranda kerngrupo, kiu ĉiam kune vagadas kaj do preskaŭ ĉiam aldoniĝas novaj homoj. Ofte estas inter 10 kaj 15 homoj sur niaj piedvagaĵoj, de diversaj aĝoj kaj devenoj.

Komune estas ia sopiro, sopiro al aparteno, signifo kaj konkreteco meze de la klimata krizo, en kiu ni troviĝas. Oni povas pensi pri kial marŝi en pilgrimformato. Kio faras la pilgrimadon taŭga maniero agi?



Mi volas ĉi tie, kiel mi ofte faras en niaj promenoj, citi Lena Bergström, kiu estas pastro en la preĝejo Equmenia kaj unu el la gvidaj figuroj en la *Pilgrimado por la estonteco* kaj ankaŭ unu el la iniciatintoj de ***La Oka Tago***. En la antologio *En grönare kyrka* (eldonejo Libris 2022), Lena skribas tiel pri pilgrimado:

"La pilgrimado estas ago kiu povas ŝajni neofenda, sed havas la potencialon esti subfosa. La pilgrimanto faras sin fremda en la mondo kaj forlasas la normalon. Ŝi enkorpigas la eliron. Ŝi forlasas sian rolon kiel utila civitano kaj nur promenas. Ĝi estas malrapida kaj malefika. Ne multe necesas sur la vojo.

En la Pilgrimado, nefarado kaj farado estas unuigitaj en la sama paŝo. Estas homoj, kiuj elektas pilgrimi en nia tempo, same kiel ĝi estis farita en malfacilaj tempoj en la pasinteco. La pilgrimanto estas simptomportanto en socio, kiu bezonas ŝanĝiĝi. Ŝi serĉas, ofte sen scii kion ŝi serĉas. Ŝi iras al la sankta, al io de daŭra valoro. Ŝi marŝas.”

Mi pensas, ke Lena en ĉi tiu teksto kaptas la malaltan radikalecon, kiun la pilgrimantoj eble portas, kaj kiu kreskas kun la vojaĝo.

Kunhavigi kunulecon, silenton, pripensadon kaj konversacion en la ĉeesto de la resto de la kreado havas mirindan potencon. Tiu malrapideco, kiun mi antaŭe opiniis iom ĝena, povas generi ĉeeston, kiu konstruas rilaton kaj proksimecon kaj inter homoj kaj inter homoj kaj la resto de la kreado.

En la plifortigo de ĉi tiuj rilatoj, la kompreno pri la diverseco de kreado kaj la konekto de ĉio povas iom post iom kreski.

La homo estas parto de ĉio, en tio, kion la episkopo emerito Martin Lönnebo nomis *la teksaĵo de la vivo*.

La speciala pozicio de homo ne temas pri tio, ke ni estus pli indaj – temas pri tio, ke ni havas pli grandan respondecon. En ĉio ĉi, mia sperto estas, ke ankaŭ la rilato al tio, kiun mi nomas Dio, povas esti sentita kaj profundigita. Ĉio ĉi donas forton kaj konstruas esperon.

En konversacio pri la lasta el niaj piedvojaĝoj, ni parolis pri tio, kion ni sopiras. Do, tiu pli granda sopiro. Pluraj diversaj temoj aperis, multaj el ili ligitaj al tuteco kaj al sincera ĉeesto kaj signifo.

Dum ni parolis, ni konstatis, ke multaj el niaj diversaj sopiroj povus esti ligitaj al la ŝlosilvortoj de la pilgrimanto. Pilgrimpastro Hans-Erik Lindström estas tiu, kiu formulis la sep ŝlosilvortojn de la pilgrimo, ”ili esprimas

la sopiron de nuntempa homo esti integra en pluralisma kaj dividita mondo” (*Lindström 2022, Pilgrimsliv-manlibro por marŝantoj, Verbum*).

La ŝlosilaj vortoj estas **libereco, simpleco, silento, senzorgemo, malrapideco, spiriteco** kaj **kundivido**.

La sep komencaj svedaj literoj formas la svedan vorton **fetblad** (speco de herbo, sedo), bona memorregulo, kaj ankaŭ bildon por la moderna pilgrima movado. Unu el niaj plej famaj dikfoliaj plantoj estas ”la amherbo” (sedo larĝfolia), ĝi kreskas sur dezerta tero kaj ne bezonas multe da akvo kaj ĝi floras bone en aŭtuno.

Ĉi-somere, du pli longaj ekskursoj estos organizitaj per Pilgrimado por estonteco. Oni iros sub la nomo **Hela jorden** kaj iros de la provinco Vermlando kaj suden tra Vestrogotio ĝis la urbo Vadstena.

La dua nomiĝas **Härlig är jorden** kaj iras tra Dalekarlio kaj Vestmanio por finiĝi en Vadstena. Ĉi tiuj promenoj estas malfermitaj al aliĝantoj, por la tuta itinero, unu tago aŭ kelkaj tagoj.

Ĉiuj informoj haveblas ĉe www.walkforfuture.se

Bonvenon promeni kun ni, por interna kaj ekstera daŭripovo!

Gudrun Norrfjärd, diakono en paroĥo Skallsjö



Preĝeja semajnfino en Sáltoluokta

Malseka somermezo ekster la zono de poŝtelefona konekteblo.



Ni ĉiuj vivas en mirinda mondo, kiu estas kovrita de malsamaj floroj, kiuj estas same belaj, kie ajn ili staras. La pastro **Emelie Holmgren** en Gällivare sendis bildojn el norda Svedio. Ŝi laboras tie por trovi la vojojn en la dia pejzaĝo, kie neniu loko estas forgesita, ekstere sur la montaraj padoj aŭ en la vestaĵlavejo. Ĉie estas senco de vivo.

Tiel same povas aspekti preĝejo, meze de la Laponia sovaĝejo.



Ankaŭ ĉi tie estas oreloj, kiuj volas aŭskulti kaj sekvi Emelie dum pilgrimadoj en norda Svedio.

Ene de la preĝeja kapelo brulas la varma fajro, kie la preĝo por pli bona mondo fariĝas grava, kiam vi renkontas vin pilgrimante.



Somermezo en Norrlando estas ankaŭ famkonata kun siaj tradiciaj kantoj kaj dancoj. Ĉi tie vivas la popolaj tradicioj.





La Laponhundo ĉiam serĉas novajn vojojn, same kiel faras la pastro Emelie Holmgren por gvidi siajn pilgrimadon supre en la nordo.

– finfine ili alvenas al la celo, la mirinda lumo de la noktomeza suno ...

... noktomeza suno!



La katedralo de Derby (Derby)

Gvidilo en Esperanto de **Riksablo**, Leeds

Dum vi aliras la katedralon, la granda mezepoka turo regas vian atenton. Se ĝi igas vin atendi gotikan internon, la malpezeco kaj koloro de la klasika navo certe montriĝos surprizo.

La konstruaĵo, kiun vi vidas, devenas de tri apartaj periodoj – la turo, konstruita frue en la 16-a jarcento, la navo de James Gibbs de la frua 18-a jarcento, kaj la post-altarejo de 1972 farita de Sebastian Comper. La paroĥa preĝejo *Ĉiuj Sanktuloj* iĝis la Katedralo de Derby en 1927, kiam estis kreita la episkopejo de Derby. Ekzistas ĉi tie preĝejo ekde saksaj tempoj. La libro "Domesday" registras ke ĝi apartenis al la reĝo kaj estis servata per kolegio de sep pastroj. Restas nenio kaj oni scias malmulton pri la konstruaĵo de tiu ĉi periodo.

La turo estas la plej malnova parto de la nuntempa preĝejo. Ĝi estis konstruita inter 1510 kaj 1530 kaj altas je 212 futoj (65 metroj) ĝis la supro de la pintoj – kaj estas



189 ŝtupoj ĝis la tegmento. La navo, kiun ni vidas hodiaŭ, estis finfarita en 1725. La rakonton, pri kiel la paroĥestro, la respektinda Michael Hutchinson, trudis la manon de la urba korporacio, malkonstruigante la mezepokan preĝejon, rakontas detale Paul Bridges en sia ĵus eldonita historio de la katedralo (havebla ĉe la bonveniga enirtablo). Li dungis James Gibbs por desegni la novan navon, kiu restis

strukture senŝanĝa ĝis sia ampleksiĝo en 1968–1972. La konstruaĵo, kiu sufiĉadis kiel paroĥa preĝejo dum 200 jaroj, baldaŭ montriĝis tro malvasta kaj neoportuna kiel katedralo, do oni malfermis la orientan muron kaj la post-altarejo estis aldonita, kune kun la sakristio, kantolernejo kaj la ĉambro "Beddoes".



La vitralojn desegnis Ceri Richards, la eminenta moderna brita pentristo. Ili reprezentas abstrakte "Ĉiuj Animoj" kaj "Ĉiuj Gesanktuloj", la mallumo kaj ĥaoso de unu kontrastas kun la lumo kaj klareco de la alia – simboloj de la lukto de la homa animo por malmergiĝi el sia fizika origino kaj la atingo de ĝia spirita kompletigo.

La suda flanknavo

Estas du memorigaĵoj de aparta intereso sur la suda muro. La unua estas tabuleto en la fora angulo de d-ro Michael Hutchinson, kiu donis al ni la navon kiel vi ĝin vidas hodiaŭ.

Pli proksima al la vando, memortabulo starigita en 1945 memorigas pri la alveno en Derbion 200 jarojn pli frue de Bela Reĝido Karlĉjo dum la jakobisma ribelado de 1745. Li estis survoje al Londono por pretendi la tronon, sed post eliro de Derby li nur atingis la ponton de Swarkestone antaŭ ol li retiriĝis. En 1979, kiam Princo Karlo vizitis la

katedralon, li estis fotografita apud tiu ĉi tabuleto.

La kapelo de Sankta Katarino

Apud la vando, dekstre, estas la ŝtupoj, kiu kondukas suben al tiu ĉi kapelo. Ĝi estis sanktigita en 1978 por disponebligi kvietan lokon por privata preĝado. Oni uzas ĝin ofte por diservoj. La altaro estas farita el Derby-graflanda marstela marmoro.

La areo Cavendish

Tra la pordego en la vando estas la areo Cavendish, tiel nomata rilate al la familia nomo de la dukoj de Devon-graflando. Tiu ĉi parto de la mezepoka preĝejo estis nomata la Ĥorejo de Sankta Katarino kaj estis flankokapelo. Elizabeto de Shrewsbury – pli konata kiel Bess de Hardwick – akiris ĝin kiel memorigan kapelon por si mem en 1556 kaj ĝi iĝis la entombigejo de la familio Cavendish.

La grandioza tombo de Bess de Hardwick, kiu estis konstruita por ŝi dum ŝia vivtempo, dominas la areon kaj klarigo superfluas, sed ankaŭ estas gravuritaj kupraj kaj latunaj ĉerkaj platoj fiksitaj sur la panelo, kiuj memorigas pri ŝiaj posteuloj. Inter ili estas tiu de Henry Cavendish, la trovanto de hidrogeno kaj la sciencisto laŭ kiu estis nomita la laboratorio Cavendish en Kembriĝo. La du grandaj memorigaĵoj okcidente de la tombo de Bess estas ambaŭ laboraĵoj de konataj skulptistoj. Tiu pri la grafo de Bessborough estas farita de Nollekens kaj tiu pri lia grafino, kiu estis de la familio Cavendish, estas de Rysbrack.

La baptujo

La baptujo estis konstruita en 1974, laŭ desegno de James Gibbs, el pentelika marmoro, aparte pura marmoro, kiu devenas de Monto Pentelikon en Grekio. Ĝi estis manfarata en Middleton-by-Wirksworth de

Leonard Petts, majstrometiisto. La paska kandelo staras apude dum bapadoj.

Subdekano Johnson

Antaŭ la Reformacio, la estro de la kolegio de pastroj estis la dekano de Linkolno.

Reprezentis lin ĉe Ĉiuj Sanktuloj en Derby subdekano, kiu, kune kun aliaj pastroj, loĝis en Kolegia Placo proksime al la norda flanko de la preĝejo. Oni kredas, ke la nekutima ligna monumento rilatas al Robert Johnson, subdekano en la frua 16-a jarcento, kiu estis granda bonfaranto.

La vando de Bakewell

Reiru tra la pordego en la navon kaj staru antaŭ la altarejaj pordegoj. La grandioza forĝofera vando, kiu dividas la navon de la post-altarejo, kaj kiu portas la blazonon de la hanovra dinastio, estis parto de la originala skemo de James Gibbs por la preĝejo. Konstruis ĝin Robert Bakewell de Derby, kiu ankaŭ faris la pordegojn, kiuj nun gardas la turan enirejon, la altarajn barilojn kaj la ferartaĵojn antaŭ la urbestra seĝaro. La altkvalita laboro de Robert Bakewell portis al li komisionojn dise en la lando, ekzemple la barilojn kaj vandojn por la Ĉambrego Radcliffe en Oksfordo.

Oni lasis malfermitan areon kiam la katedralo estis pligrandigita por disponebligi spacon por grandaj episkopaj okazoj kaj por liturgia agado, ankaŭ por koncertoj kaj specialaj eventoj. La suda flanko estas formita per la urbestra preĝbenko. La ferartaĵo estas adaptita por teni la grandan bastonegon kaj la glavon dum civitaj okazoj kaj portas la devizon de la urbo Derby, kiu estas vircervo en la parko. Kontraŭe estas la graflanda konsilantara seĝaro. Ĉi tie la feraĵo estas laŭ desegno de Anthony New, la eksa arkitekto de la katedralo, kaj enhavas riĉan diversecon de simboloj pri industrio, komerco, agrokulturo, loka registaro kaj la graflando

ĝenerale. La kverka tablo, kiu staras malantaŭ la vando iam estis uzata kiel altaro en la preĝejo de Sankta Mikaelo, norde de la katedralo. La bazo, kun siaj "palmarbaj" kruroj, portas la nomon de Joanna Edge kaj la daton 1623 kiam ŝi donacis ĝin.

La pupitro estas bela ekzemplo de ornamita Viktorina-epoko gotika metiista laboro.

La altarejo

La kanonikaj seĝoj – originale ĥoraj seĝoj – estas fare de Temple Moore, kiel ankaŭ la predikejo. Iam la ĥoro sidis en la galerio, sed en 1894 la ĉizitaj kverkaj ĥorseĝoj estis enkondukataj. La retablo de Bakewell tiam staris plu oriente je unu spano. Kiam la preĝejo iĝis katedralo en 1927, la retablo estis movita al sia nuntempa pozicio, la seĝoj estis rearanĝitaj kaj oni enkondukis la episkopan tronon. La episkopa trono venis de Konstantinopolo, kie eksparoĥestro de Bradbourne aĉetis ĝin, kaj donacis ĝin al la katedralo. La turkoj prenis ĝin el greka preĝejo dum la unua mondmilito. Ĉe la sanktigado de la katedralo la greka ĉefepiskopo Germanos transdonis ĝin formale kaj benis ĝin por ĝia nova uzo.

La sanktejo

La baldakeno sekvas tradicion de la frua eklezio, kiam oni donis al la altaro plian dignon per koverado de baldakeno. Por la plafono Sebastian Comper uzis la provilon aŭ sontabulon desegnaton de lia patro, Kavaliro Ninian Comper, por la malnova alta altaro. Ĝia temo estas la sepoblaj donacoj de la Sankta Spirito. La monogramo sur la frontono estas la Ĥio-Roo, unu el la plej malnovaj kristanaj emblemoj, formita el la unuajn du grekajn literojn de la vorto Kristo. La paska kandelo staras apud la altaro ekde Paska Tago ĝis Pentekosto.

La 18-jarcentaj lozanĝoformaj simboloj, kiuj pendas super la post-altaraj pordoj – kiel tiuj

altaj sur la tura enirejo – nun estas pure dekoraciaj. Ilia origina celo, kiam ili estis farataj, estis pendu ĉe domopordego por anonci morton en la familio – la parto de la desegno, kiu havis nigran fonon indikis tiun, kiu mortis. Kiam la funebra periodo finiĝis, la lozanĝoforma simbolo ofte estis, kiel tiuj, pendigita en la preĝejo. La kverkaj ceremoniaj seĝoj, kiuj staras kontraŭ la norda muro, estis donataj memore al Edmund Pearce, la unua episkopeja estro.

La orgenoj

Rigardante al okcidento, la granda orgeno okupas la centron de la galerio. Tiu ĉi muzikilo estis rekonstruita de Compton en 1939 kaj ĝi akiris novan keston, fare de Sebastian Comper, en 1963. Tiu estis la donaco de Herbert Ham, kiu estis la unua dekanato de Derby. Memorigilo de la pli frua orgeno restas en la orajaj keruboj, kiuj aldonas gajan noton al la senornamaj modernaj linioj de la post-altara orgeno super la ĥoraj seĝoj.

La konsistoria kortumo

La meblaro kiu staras kontraŭ la norda muro datiĝas de 1634 kaj estas farita por konsistoria kortumo, kies ĉiuj potencoj nun estas forigitaj aŭ transigitaj. Ĝi portas ĉizitan enskribon registrantan la malkonstruadon de la navo en 1722–1723. La alabastra plato sur la norda muro estas memorigaĵo pri John Lawe, kiu estis subdekanato ĉirkaŭ la jaro 1440. Origine ĝi estis ebena tomba plato. Ĝi estas la plej malnova memorigaĵo, kiun heredis la Derbya katedralo. La memorigaĵo Chambers apud ĝi estas de Roubiliac, notinda 18-jarcenta skulptisto. La Robert Bakewell, kies memoriga plako troviĝas proksime al la vando ne estis la forĝisto, kies restaĵoj estas enterigitaj en la preĝejo de Sankta Petro, sed magistratano kun la sama nomo.

Regimentaj koloroj metitaj super la norda flanknavo inkluzivas tiujn de la Sherwood-aj Arbaristoj kaj la Grenadistaj Gardistoj. Tiuj estas regimentoj kun longaj historiaj ligiloj al la Derbya areo kaj la katedralo. Ekzistas mura plato muntita de la Birmostela Asocio por memorigi pri tiuj, kiuj mortis en Birmo dum la dua mondmilito.

La turo

La turo entenas la plej malnovan sonorilaron el dek sonoriloj en la mondo. La tenoro (la plej peza sonorilo) estis forĝmuldita en la 1440-aj jaroj, do estas pli malnova ol la turo mem. La nuna horloĝa meĥanismo estas de Smith de Derby, kaj estis instalita en 1927.

La ekstero

Rigardu la sukcesan manieron en kiu Gibbs faris ponton trans 200 jaroj en la evoluo de arkitekturo. La klasika desegno de la navo neniel cedas al la viveca gotika skulptaĵo de la turo, sed ili kunvivadas harmonie.

Tage, la masiva kaj majesta turo dominas la urban ĉielhorizonton. Verŝlumigata nokte, la turo spegulas la vortojn de la psalmisto, kiuj estas enskribitaj sur la vitraj pordoj: Elsendu Vian lumon kaj Vian veron por ke ili konduku min kaj alportu min al Via monteto sankta kaj al Via loĝejo.

Ekstere, rigardante supren, tiuj kun bona vidpovo povas rimarki kelkajn groteskajn bestojn, ĉizitajn en la ŝtonon de la granda turo. Aldone, eĉ kun malforta vidpovo, oni povas viziti la retejon de la "Derby Cathedral Peregrine Project":

<https://derbyperegrines.blogspot.com/p/our-webcams.html>

kie ofte oni povas spekti la kondutojn de falkoj, kiuj kovas siajn ovojn kaj nutras la idojn en sia nesto!



The Derby Cathedral Peregrine Project


La migrofalka projekto ĉe la Katedralo de Derbyo.

La 3an de julio 1976 unu el la malpli bonkonataj kariljonmelodioj estis anstataŭigita per la melodio de "The Derby Ram (La Derbyo-Virŝafo)", regimenta marŝo asociita kun la Sherwood-Forstistoj tiel ke ĝi iĝus permanenta memorigilo de la asocio de la regimento kun la urbo kaj distrikto de Derbyo.

La melodioj estas nuntempe luditaj je 9 a.m, tagmezo kaj 6 p.m. jene.

- Dimanĉe – Thaxted
- Lunde – Truro
- Marde – The Shady Bowers
- Merkrede – All Saints
- Ĵaŭde – Lass of Paattie's Mill
- Vendrede – The Highland Laddie
- Sabate – The Derby Ram

La melodio de la sonoriloj dimanĉe:



Ĉarma Lovisa



En 1752 la sveda reĝo Adolf Fredrik vizitis la regionon de Degerby sur la bordo de la Golfo de Finnlando oriente de Helsinko kaj fondis tie la urbon Lovisa, kiun li nomis laŭ sia edzino Lovisa Ulrika. En la 21a jarcento la urbo havas ĉ. 14 500 loĝantojn. El tiuj 40 % parolas la svedan kiel sian gepatran lingvon, 55 % la finnan. Multaj loĝantoj estas dulingvanoj. La areo de la urbo duobliĝis dum la jaroj 1920–1970, kiam pli kaj pli da finnlingvaj kamparaj komunumoj estis aligitaj al la preskaŭ tute svedlingva urbo. Nun Lovisa havas lernejojn kaj por finnlingvaj kaj svedlingvaj lernejoj kaj studentoj. Ne

malmultaj finnlingvaj familioj metas siajn infanojn en svedlingvan lernejon kaj svedlingvaj familioj en finnlingvan, ĉar tio estas firma bazo por praktika dulingveco.


Siatempe Svedio intencis defendi Lovisa per fortikaĵoj mara kaj ĉirkaŭurbaj. La bonaj intencoj ĉesis pro manko de mono kaj pro ripetiĝantaj rusaj atakoj. Nun de la iniciatoj restas nur romantikaj ruinoj kaj rakontoj. Krome, en 1855 furiozis incendio, kiu detruis preskaŭ la tutan urbocentron, konsistantan el lignaj domoj kaj preĝejo. Tamen la kvartaloj en "Nedre stan" (= malpli supra urbo) saviĝis. Nun ili ĉiujare logas vizitantojn al la eventoj



“Malfermaj ĝardenoj de Lovisa”, “Malnovaj domoj de Lovisa” kaj “Julodomoj de Lovisa”. Bonŝance la urbo ne malkonstruigis la domojn, kvankam ili estis malkomfortaj kaj en malbona stato en la 1970aj jaroj. Viziteblas ĉiujare dudeko de privataj ĝardenoj kaj kvardeko de domoj almenaŭ centjaraj. La loĝantoj ŝatas rakonti pri la historio de siaj domoj, ili konsilas pri la restaŭrado kaj pri malnovaj konstrumaterialoj kaj metodoj. Kelkaj nunaj posedantoj proponas al la vizitantoj kafon kaj teon senpage, aliaj ĝisfunde klarigas la devenon kaj uzon de la plantoj en la ĝardenoj. Pluraj domoj kaj ĝardenoj havas ĉarmajn nomojn, kiuj baziĝas sur historio, legendoj aŭ situo. En 2023 en la ĝardenoj de Lovisa oni ofte aŭskultas muzikon, ĉar onidire tio igas la plantojn bonfarti. Precipe Chopin estas ŝatata de rozoj.



Unu el la plej malnovaj domoj nun malfermaj al vizitantoj nomiĝas Kungsdammen/Kunikaanlampi, t.e. la Reĝa lageto. Finna-rusa paro aĉetis ĝin en 2002, restaŭris kaj parte renovigis la enon, por ke ĝi



estu komforta. Tamen ili konservis ĝian plej malnovan parton, en kiu meze de la 18a jc modeste loĝis iu armea oficiro. La lageto en la ombro de altaj densaj arboj estas restaĵo de la fortikaĵo planita en la tempo de la svedaj reĝoj. Nun rando de la lageto prosperas trankvila, kolorplena, interesa ĝardeno kun statuetoj, benkoj, subĉiela kaj endoma kafejoj, perenoj importitaj de la oriento kaj okcidento. La dommastrino Olga Isaeva scias tre lerte kaj arte kunigi diverskolorajn kaj diversformajn plantojn, ne paroli pri la ingrediencoj kaj spicoj de ŝiaj frandindaj bakaĵoj. En la kafejo kaj la apuda vendejeto la vizitantoj povas informiĝi finne, svede, angle kaj ruse. Ili ankaŭ aĉetadas loke faritajn ĉarmajn bildkartojn kaj suvenirojn.





Inter la vidindaĵoj kaj vizitindaĵoj de Lovisa mi ankoraŭ menciu la konkurson de malgrandaj ŝipoj (Small Ships' Race), la malnovan kulturan urbocentron kun helruĝa urbodomo, novgotikan preĝejon, pavilonon sur altaĵo, de kie oni povas okulumi la belajn pejzaĝojn, la marbordan naĝejon Plagen. Kompreneble troveblas ankaŭ muzeoj, restoracioj, kafejoj, hoteloj kaj pli modestaj gastejoj, tendumejo. Lovisa estas konata ankaŭ pro sia internacia

muzika kaj arta vivo, lignaj manfaritaj boatoj, tabakfabriko, alkoholdistilejo, bierfabriko, sanatorio, nukleaj centraloj. En 2023, ĝis aŭgusto la 6a, la vizitantoj povas konatiĝi ankaŭ kun la moderna arkitekturo de dudeko da privataj domoj ĵus konstruitaj.

Rete vi trovos pli da informoj en sveda kaj finna lingvoj, ekzemple ĉe loviisanwanhatalot.fi/sv.

Raita Pyhälä



El Odeso, Ukrainio, venas nova kontribuanto al Ora Ĵurnalo – Tatjana Auderskaja – koran bonvenon!



Kaj, legantoj de Ora Ĵurnalo, bonvenon al la retejo de Tatjana Auderskaja. Originala kaj tradukita prozo kaj poezio:



<https://auderskaja-retejo.herokuapp.com/tradukitaj-kantoj>

Tatjana bonkore donis al Ora Ĵurnalo la rajton preni prozojn kaj poemojn el sia retpaĝo. Mi unue elektis ŝian mikronovelon **La bela rozo**, kiu ricevis honoran mencion en la Belartaj Konkursoj de UEA en 2021. Poste mi elektis poemon de Erinaco.

La bela rozo

Oni donacis al mi superban rozon. Ĝi estis diafana kaj trembrilis kaj glimis per miloj da

lumoj: ruĝaj, verdaj, violaj. Ravita pro ĝia beleco, mi tenere ĉirkaŭpolmis ĝin kaj kaŝis ĉe la sino, proksime al la koro.

Sed baldaŭ mi ekhavis tre strangan impreson, kvazaŭ io frida tuŝas mian bruston, kaj poste eksentis, ke malvarmaj fluoj kuras laŭ la korpo. Kun miro mi gapis – kaj trovis nur grandan malsekan makulon, kiu tiel malagrable incitis la haŭton.

La rozo estis el glacio.



Erinaco

Teksto: Junna Moroz.

*Muziko: Sergej Nikitin kaj
Tatjana Nikitina.*

Traduko: T. Auderskaja.

Bildo el la retejo.

Laŭ bosko ĉeriza,
Laŭ bosko meriza,
Por naskiĝtag' de l' amik'
Paŝadis en paco
Sur pad' erinaco
Kun la flutet' en manik'.
Sunon rigardis li,
Floretojn gardis li,
Treti ne volis dum voj',
La kokcinojn,
La fungajn ombrelojn
Li kore salutis kun ĝoj'.
Pinglaj abioj!
Pro kio kun krioj
Kuras pikita vulpid'?
Inter amikoj
Sen artifikoj
Ekregu nur am' kaj konfid'!

Bluas ĉielo nun,
Sub varma hela sun'
Por naskiĝtag' de l' amik'
Fluton ludante
Kaj piedfrapante
Jen paŝis l' etul' tra erik'! (fajfado)
Kara birdeto!
Al vi estas peto:
Flugu laŭ ruĝa monril'!
Tie ĉe l' bovo
Atendas vin trovo:
Plumo el via flugil'.
Jen kun donaco
Laŭ pad' erinaco
Paŝis al sia amik'.
Sed kion li portis,
Li nure raportis
Al Vanjo per flut' el manik'!



Aldono de Siv: Gotenburganoj antaŭe konatiĝis kun Laure d'Illiers Patas, kiu ankaŭ konkursis per mikronoveloj, kaj troviĝas en la libro *Ĉiuj steloj etas nokte*. Nun ni konatiĝas kun Tatiana Auderskaja, kiu ankaŭ troviĝas en la libro.

El Interreto: Odeso estas urbo en suda Ukrainio kaj la ĉefa haveno de la lando. La populacio sumiĝas al proksimume 1 miliono da loĝantoj. La konstruaĵoj de Odeso estis tre difektitaj dum la Dua Mondmilito. Post la Sieĝo de Odeso, la plej granda parto de la juda populacio estis ekstermita. 30 000 homoj murdiĝis. La 25-an de januaro 2023, la historia centro de Odeso estis nomumita *Monda Heredaĵo* de Unesko.

Saluton el Aŭstralio



Saluton de **Ken Sayers** kiu vizitis la urbon Bendigo en Aŭstralio, kie li havis bonegan kulturalan sperton.



Ni havis nekredeblan kulturalan sperton lastatempe ĉi tie, almenaŭ por mi. Mi estas membro de asocio, kiu volis reklami operojn verkitajn de Richard Wagner. Mi estis membro de simila asocio en Svedio. Ni sponsoras kantistojn kiam Opera grupo prezentas Operon de Wagner, do ni kutime ricevas aliron al biletoj pli frue ol la plimulto.

Opera Aŭstralio faris du produktaĵojn de la plej bonega laboro de Wagner, "Der Ring des Nibelungen" (La Ringo), en 2013 kaj 2016. Ili planis alian produktaĵon en decembro 2021, sed ĝi estis prokrastita pro la pandemio. Nun ĝi estas planita por novembro–decembro ĉi-

jare. Mi havas biletojn, kiujn mi aĉetis en 2020.

La Ringo konsistas el kvar operoj, "Das Rheingold", "Die Walkyrie", "Siegfried" kaj "Götterdämmerung". Ni havas lokan Opergrupon en Melburno, kiu vivas plejparte per donacoj de riĉaj personoj. Mi konas la muzikdirektoron de la Melburna Opero, Greg Hocking, de multaj jaroj, kiam societanoj ricevis aliron al prezentado de la Wagner Opero "Lohengrin".

Ili komencis fari produktaĵon de "La ringo" frue en 2021. Mia edzino Debbie kaj mi iris al tagmanĝo, kie la muzikdirektoro parolis kun la fama brita direktisto, Anthony Negus, kiu venis ĉi tien por la produktaĵo de la unua Opero, "Rheingold". Debbie devis foriri tuj post la tagmanĝo, ĉar ŝi havis rendevuon de kuracisto, sed mi restis kaj parolis kun la muzikdirektoro kaj la direktisto. Okazis, ke la Aŭstraliaj Tenisaj Ĉampionecoj tiam okazis, kaj mi aĉetis biletojn je bona prezo pro la pandemio. Do, kiam la muzikdirektoro diris, ke la direktisto ŝatus iri al teniso, mi diris, ke restas al mi bileto, ĉar mi aĉetis tri, sed mia filino Juliette laboros unu el la tagoj. Tiam Debbie donis sian bileton al la direktisto kaj lia edzino venis al la teniso kaj vidis, interalie, matĉon kun Naomi Osaka!

Nun mi venas al ĉi tiu jaro. Melburna Opero planis fari produktaĵojn de la Ring-Operoj, unu el ili jare, ĝis ili estos farinta ĉiujn kvar kaj poste fari ĉiujn kvar la sekvan jaron, sed ni havas problemon ĉi tie en Melburno, ĉar ili fermas la ĉefan teatron por renovigo dum du jaroj! Do, Greg Hocking elpensis la ideon rigardi ekster Melburno kaj trovis teatron en Bendigo, kiu povus funkcii. Do, post kiam la unuaj du operoj estis surscenigitaj en Melburno, kaj la tria havis koncertan

produktadon, ili decidis fari la tutan "Ringon" en Bendigo.



Kiel kutime, kiam ili faris tian ampleksan eventon, ili faris tri ciklojn, t.e. ili faris la kvar operojn tri fojojn. Ili faris la unuajn du operojn unu semajnfinojn, vendredon nokte kaj dimanĉan posttagmezon, kaj la duajn du la sekvan semajnfinojn. Ni havas konatojn el la Svedia Eklezio, kiuj loĝas en Bendigo, do, mi kontrolis, kiuj semajnfinoj taŭgas por ili. Do, mi iris sur la trian ciklon. Jam vidinte la unuajn du operojn en Melburno, mi elektis ĉeesti nur la duan semajnfinojn.

La teatro estas mirinda. Ĝi estas konstruita en malnova malliberejo, do, ĉe la enirejo vi preterpasas malnovajn prizonojn. Wagner-operoj ĝenerale kaj "La ringo" aparte postulas masivan orkestron, ĝis proksime al 160 muzikistoj kun ses harpoj por la "Rheingold". Ili ne povis konveni tri el la harpoj en la orkestra foso, do ili devis sidiĝi flanke. La tuta opero estis mirinda. Kantistoj estis entute escepte bonaj.

Ili elektis nur uzi lokajn kantistojn male al Opera Australia. Io, kio povas esti problemo kun Ring-operoj, estas ke numero tri, "Siegfried", daŭras ĉirkaŭ kvar horojn, kaj numero kvar, "Götterdämmerung", ĉirkaŭ kvin, do "Siegfried" komenciĝis je la 16-a kaj finiĝis je la 22-a kun du paŭzoj, la unua je 60 minutoj kaj la alia je 75 minutoj.

"Götterdämmerung" komenciĝis je 14:00 kaj finiĝis je 20:45 kun la samaj paŭzoj.

Oni devas havi ripoztagon inter operoj ĉar kelkaj kantistoj devas multe kanti. La kantisto kiu havas la ĉefrolon en "Siegfried" estas sur scenejo por proksimume 85% de la tuta opero kun la nomo "Siegfried".

/ Salutas Ken el Aŭstralio



Ken Sayers venis al Svedio en la malfruaj 1980-aj jaroj kaj komencis labori pri komputilaj kaj telefonaj projektoj ĉe Ericsson. Li havis multajn interesojn: bicikladon, klasikan muzikon, sonsistemojn, lingvojn kaj multe pli. Li ricevis apartamenton kun balkono. En la balkonkestoj li plantis bluajn kaj flavajn florojn kiel grandan svedan flagon. Post nur kelkaj semajnoj li ekparolis la svedan. Li frue aliĝis al la sindikato, kies prezidanto li iĝis post kelkaj jaroj. Estis memkompreneble por li aliĝi al la Biciklada Societo en Gotenburgo, kies prezidanto li ankaŭ baldaŭ iĝis. Post kelkaj jaroj, li translokiĝis hejmen al Aŭstralio, tiam kun sia edzino kaj filino. Kelkajn fojojn post tio, ili estis ĉi tie en Svedio kaj vizitis nin kaj aliajn, ĉiam same agrablaj!

/ Lars Olof Granat

Aventuro en Naŝvilo, Tenesio, kun Kristina Jonäng



En majo ĉi tiun jaron mi vojaĝis en Tenesio por, interalie, lerni pri la originoj de kontreo (muzikstilo), rakontas Kristina Jonäng.

